Gerda Illerhues,

Erikejo-bildo

tradukita de Manfred Retzlaff

Nodaj pinarboj[4]
sur sabla land',
floras eriko
ĉe vojo-rand'.[5]

Glimas betuloj,
marĉa vapor',
ĉirpas la griloj
dance en ĥor'.

Flustras la pinoj,
sombra lumbril',
floroj baskulas
en la trankvil'.

Sole gardstaras[6]
jen juniper',
sonoriloj vokantaj
en la vesper'.

Traduko de la Germana poemo "Heidebild" de Gerda Illerhues *(∗1930) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2001-06.*

MR-352-1b / Arg-772-1547 (2013-01-16 11:50:30)

[4] aŭ:
Pinoj nodhavaj

[5] aŭ:
ĉe l' vojorand'.

[6] aŭ:
Sole jen staras
la juniper'.